## 5. Subite progresis ŝovinismaj partioj

### Malvenko de la regantaj partioj

En la elekto por la Ĉambro de Konsilistoj okazinta la 20an de julio 2025, la konservativa registaro konsistanta el Liberala Demokratia Partio (LDP) kaj Koomei-Partio (Koomei, religia partio) ne sukcesis gajni plimulton de la seĝoj, same kiel en la elekto okazinta en la pasinta oktobro por la Ĉambro de Reprezentantoj.

LDP + Koomei: 122 seĝoj
Opoziciaj partioj: 126 seĝoj
Sume: 248 seĝoj

Rezulte, kaj en la Ĉambro de Konsilistoj kaj en la Ĉambro de Reprezentantoj la regantaj partioj ne sukcesis havi plimulton, tial la regantaj partioj jam ne povas duope fari leĝojn sen aŭskulti opiniojn de la opoziciaj partioj. La kaŭzoj de la malvenko de LDP estas jenaj malkontentoj de popolanoj:

1. Detruo de agrikulturo kaj socialasekuro
2. Tridek jaroj da ekonomia stagnado
3. Monskandaloj
4. Milita ekspansio laŭ la postulo de Usono kaj malrespekto de la Packonstitucio
5. Detruo de la vivo pro altiĝantaj prezoj.

La malprogreso de LDP estas nek hazarda, nek provizora, sed kontinua kaj serioza. Ĉi tiu malkresko de subteno daŭras jam de pluraj jaroj. Kiam ni rigardas la voĉojn, kiujn LDP gajnis en la lastaj tri elektoj, tio estas klara.

Elekto por la Ĉambro de Reprezentantoj en 2021:
19.91 milionoj da voĉoj

Elekto por la Ĉambro de Reprezentantoj en 2024:
14.58 milionoj da voĉoj

Elekto por la Ĉambro de Konsilistoj en 2025:
12.76 milionoj da voĉoj

Kiuj forlasis LDP-on, tiuj estas homoj en kamparaj regionoj, nome agrikulturistoj. Multaj el ili ne plu subtenas la agrikulturan politikon pri rizo de LDP. La subtenbazo de LDP kolapsas.

Ĝis nun frakcioj de LDP alterne elektis ĉefministrojn, kreante "pseŭdoŝanĝon de la registaro" por konservi la potencon, sed tio jam ne funkcias. Rezulte, la publiko serĉis eblojn ekstere, puŝante LDP-on al malvenko.

**Leviĝo de ŝovinismaj partioj**

En ĉi tiu elekto, la voĉoj forlasintaj LDP-on ne iris al Rikken (Konstitucia Demokratia Partio), la plej granda opozicia partio, kaj la Komunista Partio, kiuj forte kontraŭis la politiko de LDP, sed iris al Kokumin

(Popola Demokratia Partio), kaj Sansei (laŭlitera traduko: Partio por partopreno en politiko, sed la partio mem tradukis sian nomon anglen kiel “Party of Do It Yourself”, Esperante “Partio de Mem faru ĉion”), kiuj ĝis tiam estis malfortaj partioj, tamen ĉi-foje multe progresis jene:.

Kokumin: 9 seĝoj → 22 seĝoj
Sansei: 2 seĝoj → 15 seĝoj

La kialoj de la sukceso de ĉi tiuj du partioj estis jene: Unue ili lerte uzis SNS (socian retservon) en sia balotkampanjo por agiti malkontentajn homojn en la 40-aj kaj 50-aj jaraĝoj, kiuj estis devigitaj vivi malfacile sub la neoliberalaj politikoj enkondukitaj de LDP. Tiuj homoj eksubtenis ĉi tiujn du partiojn, kiuj ŝajnis povi fari ion novan.

Due establitaj partioj kiel Rikken, Koomei kaj Japana Komunista Partio estis rigardataj kiel "parolantoj nur pri negativaj aferoj", kaj tiuj malkontentuloj ne turnis sin al ili. La rezulto estis jena.

Rikken: 38 seĝoj → 38 seĝoj
Koomei: 27 seĝoj → 21 seĝoj
Komunista: 11 seĝoj → 7 seĝoj

**Sansei dissendis falsajn informojn**

Kvankam mi ĝojas, ke la koalicia registaro de LDP

kaj Koomei malvenkis, mi estas terurita de la rapida kresko de Sansei kaj alia ŝovinisma partio Hoŝu (konservativa, fakte dekstra. La seĝoj 0 → 2).

La gvidanto de Sansei, s-ro KAMIJA Soohei (naskita en 1977), pledis por "Japanio Unue" kaj altiris atenton per siaj agitadaj kaj sebazaj paroladoj, kiel ekzemple "Fremduloj estas traktataj pli bone ol la japanoj", "Kronviruso estis artefarita", "Profunda ŝtato manipulas la mondon" kaj "Nukleaj armiloj estas malmultekostaj. Ankaŭ Japanio devos esti nuklearmigita."



**Homoj kolektiĝis por aŭskulti la paroladon de Kamija.**

Laŭ iu gazetartikolo, ĉe la monkolekta kunveno de Sansei, al la ĉeestantoj svingantaj japanajn flagojn (simbolo de dekstruloj), antaŭmilitaj armekantoj estis luditaj senĉese kaj filmoj de kamikazaj pilotoj estis montritaj sur la ekrano. Unu ĵurnalisto diris: "Sansei estas sinonima kun s-ro Kamija. Ĉiuj kandidatoj kaj membroj de la partio aliĝis, ĉar ili adoras lin."

Tiuj, kiuj voĉdonis por la partio, verŝajne spertis malfacilaĵojn trovi dungadon, finiĝinte universitaton, kaj luktis por vivteni sin, kio kondukis ilin al subteno de senbazaj asertoj kiel "Japanio unue" kaj "Forpelo de fremduloj". La neoliberala ekonomiko de LDP, ĝia fokuso nur pri prosperigo de la grandaj entreprenoj kaj ĝia neglekto al laboristoj dum la pasintaj 30 jaroj rezultigis naskon kaj progreson de ĉi tiu politika partio surbazita sur stranga, konspira teorio.

**Konstitucio proponita de Sansei**

Legante la "Konstitucion" publikigitan de la Partio, oni vidas, ke ĉi tiu partio estas la kompleta malo de postmilita demokratio kaj socia disvolviĝo.

Ĝi estas terura deklaro. Legu sube:

**Imperiestro**

1. Japanio estas la nacio regata de la Imperiestro, en kiu

la Imperiestro kaj la popolo estas unu.

2. La Imperiestro prezidas la tradiciajn religiajn ceremoniojn de la nacio kaj unuigas la popolon.
3. La Imperiestro estas sankta estaĵo, kiu preĝas por la feliĉo de la popolo, kaj ne estas atencita.

**Civitanoj**

1. La kvalifikoj por japana civitaneco estas determinitaj per leĝaro surbaze de jenaj kriterioj: la patro aŭ patrino estas japana, la gepatra lingvo estas la japana, kaj havi koron ami Japanion.
3. Civitanoj havas la devon protekti Japanion por siaj posteuloj.

**Familio**

1. La familio estas la fundamento de la socio, kaj la familimembroj helpu unu la alian kun kompato.
3. Geedzeco baziĝas sur la kuniĝo de viro kaj virino, kaj ambaŭ geedzoj havu la saman familian nomon.

**Edukado**

1. Civitanoj havas la rajton ricevi edukadon, kiu kreskigos la kapablon lerni kaj pensi sendepende.
4. La Imperiestran Mesaĝon pri Eduko kaj aliaj imperiestraj ediktoj, patriotismo, manĝaĵo kaj sano, lokaj ritoj, rimarkindaj historiaj figuroj kaj tradiciaj eventoj devas esti respektataj en edukado.

La nuna konstitucio de Japanio estas konstituciisma konstitucio, kiu celas bremsi arbitron de la potenco, kiu povas atenci homajn rajtojn kaj enmiksiĝi en la vivon de siaj civitanoj. Tamen, la konstitucio de Sansei estas la malo, promesante senbridanjn agojn al la potenco kaj trudas eĉ moralecon al la popolanoj. Ĝi trudas al la popolanoj ankaŭ la ideon, ke la "Imperiestro estas dio", kiel antaŭ la dua mondmilito, kaj proponas, ke infanoj denove lernu la Imperiestran Mesaĝon pri Eduko, kiu instrukciis ilin "morti por la Imperiestro".

Ankaŭ ksenofobio estas klara. Homoj, kiuj ne havas japanan patron aŭ patrinon kaj kies gepatra lingvo ne estas la japana, ne povas akiri japanan civitanecon.

En Japanio, geedza paro ne rajtas havi malsamajn familiajn nomojn, kaj multaj virinoj suferas pro tio. Nuntempe kreskas movado por permesi al ili havi malsamajn familiajn nomojn, sed la politiko de Sansei estas la tuta malo, neante la rajton de virinoj, kiuj volas konservi sian originan familinomon. Tio estas reveno al antaŭmilita tempo.

**Japanio estas ĉe grava vojkruciĝo**

Multaj homoj emas pensi, ke tiu partio kun ridinda konstitucio neniam akirus potencon, sed rigardante retrospektive al la ekpotenciĝo de Hitler, ankaŭ Sansei

povos havi ŝancon. La Nazia Partio de Hitler estis komence malgranda marĝena partio, sed antaŭ ol oni sciis, ĝi ekpotenciĝis kaj finfine okazigis la Duan Mondmiliton. En Usono, prezidento Trump faras, kion ajn li volas, kaj atakas usonan demokration. Ankaŭ Trump estis komence marĝena kandidato. Tamen li nun havas grandegan potencon, laŭte kriante "Usono unue" kaj kaŭzas kaoson kaj teruron en la mondo, tial povas esti, ke ankaŭ "Japanio unue" havos similan progreson.

Mi sentas, ke Japanio estas ĉe grava vojkruciĝo. Ni alfrontas la demandon, ĉu ni povas malhelpi la kreskon de danĝeraj partioj kiel Sansei kaj aliaj aŭ ne.